



# La Suda Kruco

*Organo de la Internacia Lingvo Esperanto en Australio,  
Nov-Zelando, Kaj. Fondita en Julio 1920.*

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

---

**N-ro 112 (Ninth Year) Melburno (Melbourne), Australio. 10 Oktobro 1929**

---

## ESPERANTO.

**A concise History of the International Language.**

(By Wm. King, D.B.E.A., Secretary  
N.Z.E.A., Wellington. N.Z.)

(Continued.)

1927 saw Esperanto officially authorised as a subject for instruction in all teachers' institutes for training of elementary and secondary school teachers of Greece, and in all Aeronautical schools of Poland. During the year the 40th Jubilee of Esperanto was celebrated at the 19th World's Congress of Esperanto at Danzig. The Union of International Broadcasting Organisations met at Lausanne in May, and, having investigated the question of an international radio speech, recommended in favor of Esperanto. At this time 140 radio stations had broadcast Esperanto lessons and speeches, this fact providing the base for the Broadcasting Union's decision. The "Peace through the Schools" Congress, in which 19 countries were represented, was held in Prague, Esperanto being the sole language used.

Last year (1928) an enquiry was conducted by the Königsberg broadcasting station which operates over several European countries. In response to its appeal, listeners-in showed their preference for Esperanto over other languages by a large majority. 24 new courses were commenced in the elementary schools at Vienna, and teachers at the Normal School in Helsingfors who take the training course study Esperanto as a compulsory subject.

The University of Toulouse commenced publishing scientific articles in Esperanto. Professor J. Findlay conducted a vocational course of Esperanto at Manchester University, the course being attended by teachers from all parts of Britain. During the year Esperanto was taught in 48 towns in Saxony, 400 teachers being fully qualified to instruct. The courses were subsidised and fostered by the Government. Remarkable progress was made throughout the year in Sweden, where three years previously the Swedish Esperanto Federation announced a free Esperanto course, 1000 students enrolling the first year, 2000 the second, and 3000 the third. Up to August, 1928, 1000 new students were being enrolled each month. The Swedish Parliament this year authorised subsidy of 3000 Krone (£168/15/-) for the organising of Esperanto courses. The Farman Aviation Company announced during the year that its pilots must undergo an Esperanto course. Japan published various reports in Esperanto regarding meteorological and other scientific subjects. The advantages of the talking films—as with radio—introduced a new aspect of the language difficulty; producers find that national languages limit their activities. However, investigations of the international language are being carried out, and the opinions of Mr. Fred. Niblo, the producer of "Ben Hur" and Mr. Clarence Brown who produced "The Trail of '98," are worthy of consideration. The latter says:—

"Esperanto will at last become an

established fact. Talking pictures will make it absolutely necessary for the world to have a common language. The success of the talking films in this country will spread to Europe and South America, and unless Esperanto is understood generally the international exchange of talking pictures will be impossible. The idea of bringing the adoption of Esperanto to a head is not as far-fetched as it seems at first glance. The world has been on the point of accepting a universal tongue for some time and it needs but little more to bring on general acceptance. It is said that Esperanto is learned easily, and in an exceptionally short time. A person does not have to be a born linguist to grasp it immediately.

"The future great pictures of America, France, Germany, Russia, Sweden, Italy, will be confined to the country in which they are made unless the same dialogue is spoken in each. The producers realise this and steps will be taken immediately to promote Esperanto so that when the time comes in the not distant future when every theatre of the world shows talking movies, the whole world will be able to understand the same picture. It is reiterated, making a talking picture at least ten times, in ten different languages, synchronising the words and action in each instance, is financially impossible. There is but one solution—Esperanto."

It is significant that many film stars have already expressed their willingness to learn Esperanto.

(To be continued.)

## WAYS TO A WORLD LANGUAGE.

There are four ways to a world language, whether used as auxiliary to the mother tongue or as the sole speech of mankind. First, the fusion of all tongues as the result of the intermingling of the peoples. Secondly, the gradual cultural and economic dominance of one powerful language over all others, to the eventual absorption of them. These two would be lengthy processes indeed. Thirdly, acceptance by the powers of some national tongue, to be used in all foreign relations. Fourthly, adoption by the Powers or the peoples of a composite neutral auxiliary language.

1. It is maintained by some that the merging of the world's peoples by reason of the ever-increasing facilities of transport and inter-communication will result in the gradual emergency of a tongue common to all men. Philology does not unreservedly voice the same belief. Prof. T. Cart, of the Sorbonne, ventures to call such reasoning fallacious and says that in the 19th century it was widely but erroneously held by students of the subject that there was a tendency to centralisation in language, to the eventual dominance of a few chief tongues. But to-day there are more languages than in 1914. Not centralisation, but federation is the characteristic of present-day Welt-politik. The nations draw together in politico-economic groups, but an intense national spirit prompts them to guard jealously the tongues of their fathers. In Russia some 80 languages are following distinct lines of evolution; zealously fostered, each according to its peculiar genius, Czech, Catalan, Magyar, the diverse tongues of the Baltic States and a string of Slav idioms in the South-East of Europe, most of them born of the break-up of Austria-Hungary and the partition of Western Russia, all join to weaken faith in a natural unification of European language.

2. History shows that the vast increases in language territories gained by this or that dominant nation are not permanent. Greek and Latin, interlanguages in a limited sense, have ceased to be such. The day of French for such a role has passed. The progress of Arabic is equalled or passed only by English, which in turn shows signs of having reached its high-water mark of expansion. Wells says the possibilities that still in a dwindling degree exist for resolute statesmen to make English the common language of communication for all Asia south of the Himalayas will probably pass away. "One is surprised to discover how slow the extension of English has been in the face of apparently far less convenient tongues. It still fails to replace the French in French Canada, and its ascendancy is doubtful to-day in South Africa after nearly a century of British domination."

3. Prof. Guion points out that while languages borrow words and idioms from one another there is no

instance of one tongue adopting the syntax of another. He adds that one could learn ten vocabularies in the time that it takes to master the subtleties of syntax in one tongue. Herein lies one of the difficulties confronting those advocating the adoption of a national language. Experience of instructors of French in the schools in this country and others is not encouraging; it might be called disheartening when one considers the vast expense of time and patience devoted to the study of an idiom, which, contrary to general belief, is one of the subtlest languages of Europe. For that matter, Italian or Spanish, simpler from the phonetic and syntactical points of view, would seem to be better fitted to the purpose for which French is taught in our Schools. But it is questionable whether the gain, namely the production of a few prize winners of linguistic bent, repays the cost and care involved in such instruction, especially in a monolingual country.

4. The solution then would appear to lie in the adoption of some form of artificial synthetic language easy of acquirement, characterised by neutrality, but based on the chief idioms of Europe. Such would not only give no country undue cultural or economic advantage over the others, but would also attract the peoples to a profitable study of the nature and structure of their own language.

—ROBO

## STENOGRAFIO KAJ ESPERANTO.

Neniu flugrapidskribisto povas juste plendon elpuŝi pro malatento de stenografi-fakuloj. Jen ni ricevis por recenzo (vana peto!) tri sistemojn adaptitajn aŭ originalajn je Esp-o. 1. Internacinal stenografio en ĉiuj kulturlingvoj, Duisburg Friedenstr. 79, Germanlando. 2. Sistemo Brabbee, Wien 1, Akademie-str 12. 3. Duploye-Flageul, "La Poezio de Zamenhof" en stenografio. La aŭtoro donacas al ĉiu aĉetinto de tiu libreto sian lernolibron de la sistemo. S-ro Flageul, 9 Boulevard Voltaire, Issy, Seine, Francujo. Prezo 1.50F.

## BUDAPEST KAJ LA JURNALARO.

Ankoraŭ en la Aŭstralazia taggazetaro ĉi-jare ni vidas tute nenian rimarkon pri la Esp-a kongreso. Kial tio, post la plendo de ni farita al nia centro ĉe Genevo lastan jaron?

Sufiĉe longaj raportoj troviĝadas trajare, informantaj pri sciencaj, privirinaj, junulaj, reklamaj k alifakaj kongresoj, eĉ la malgrandaj. Ni ŝatus klarigon de Genevo aŭ la respondeca funkcidevuloj en tiu ĉi rilato. Kion faras la angloj ĉe I.C.K.?

## SYDNEY ESPERANTO SOCIETY.

Oct. 17.—Why not the U.E.A.? L. E. Pfahl.

Oct. 24.—The Aftermath of War. Mr. W. J. Morrison.

Oct. 31.—Musical Evening.

Nov. 7.—The Human Mind. Mr. A. Feldmayr.

Nov. 14.—Why is Esperanto? Mr. E. A. Pryke.

Nov. 21.—Opposing Forces. Mr. E. Hart.

Nov. 28.—Members.

## PROPONO DE ESPERANTO- INSTRUISTO.

Dediĉinte mian vivon al esp. movado, mi serĉas esp. laboron. Mi proponas min kiel instruiston kaj lekciiston en E. en ia urbo de Aŭstralio, N.Z. aŭ Pacifiko, kie ekzistas E. Societo, kapabla inviti min por tiu celo. Mi povas gvidi komenc-aŭ altajn kursojn, lekcii publike por samoj kaj neesperantistoj pri diversaj temoj, aranĝinte la kvazaŭ peresperantan Fakultaton. Per tiuj pagataj de publiko lekcioj la invitinta E.S.-to povas eĉ mone profiti. Mi havas oficialan diplomon por E. instruisto, donitan de U.E.A. Mi estis instruisto de E. en PEKINA Esperanta Kolegio, en TOKIO, en SIBERIO.

Proponojn kaj invitojn sendu al Sro I. Serišev, G.P.O., Box 2988-NN, SYDNEY.

## QUERY CORNER AND CORRESPONDENCE.

Under this head are invited questions on Esperanto history and language. Contributions in the form of short articles, verselets, sketches, etc., are appreciated.

M.C.T. in E. Thanks for appreciation.

Mimo en B. "Strikt," Fabeloj de And. Vol. 1, 151/7, 2 Sam. 20/8 is

derived from the Latin strictus, p.p. of stringere, to draw or bind tight, to compress, urge. In the Esperanto text it means "tight-fitting."

Koto in L. "Tehniko de Glufabrikio" is too sticky for us to handle.

Umulo in F. Will appear in the fullness of time.

Infanulo. The pronunciation of "kolorriĉa" although not easy for the English, who do not trill the "R," is not difficult for the Irish, Scotch, and several Continental nations.

Talentulo. "Alesperoj"; read "disappointments."

Precizamiko in A1. "Lunde," Fabeloj de And. Vol. 1, 130/39. We think Cox is right and that the precise signification is "Mondayly, on Mondays," but through the loose usage of many writers the adverb has taken to itself also the meaning of "on Monday," and Zamenhof may have ceded to this fairly general custom. Use it, however, only with the sense first given.

Lardule. The terminus for "La Vojaĝanta Pikemulo" was the W.P. basket.

### SOMERA MALGRASIĜO DE GAZETOJ?

Ĉu fakte ke iuj gazetoj ne bone eltenas la brulveteron; ke ili kvazaŭ formetas la karnopezon k eliras el presejo iom maldikaŝpektantaj pro malvigliga veterpremo? Tute ne. Alikiale estas! La geoficistaro ferias, aŭ kongresas, k al la Esp-istaro mankas emoj legi! Do la maldikiĝo estas memvola k intencita por tio ke la abonantaro ne tre ĝenu sin per troa somera legdevigo. Vidu Heroldon de E-to, n-ro 27.

La redakcio ŝate ricevas opiniojn de la legantoj pri aplikebleco de tiu brila ideo al La Suda Kruco. Jam alvenas somera varmego. Ĉu vere velkas pro la ŝvitiga sunbrulado legemo de sudkrucaĵoj, k ĉi malvigligas ilia atendumo al aperado de nia gazeteto? Ni espere pensas ke tute ne. Prefere ni imagokule vidas legantojn oportune kuŝsiantajn en ombro de intermontetaj filikarboj, aŭ ĉe plaŭde muzikantaj sablej-ondetoj, kie ili avide suĉas encerben la Sudan Krucon preparitan por sia regalo.

Ĉu vi ne bonvolos konstati la fakton pri via ĝusta financrilato al nia organo, karaj legantoj, montrante per daŭre ĝisdata abonanteco vian ŝaton al ĉi tiu gazeto? Antaŭe mi dankas elkore al ĉiuj subtenantoj nunaj k estontaj.

REDAKTISTO.

### THE ENSOM BEQUEST.

At a meeting of the council of Workers' Education Association in Christchurch it was decided to accept the bequest for a class in Esperanto, and that for the purpose of securing the Government subsidy, the amount be transferred to the Board of Governors of Canterbury (University) College, Christchurch, the Board, in accordance with the recommendations of the W.E.A. and the tutorial class committee, to appoint the tutor for the class, Mr. Bell, M.A., being recommended as tutor. It is not yet known whether Canterbury College will accept.

### ESPERANTO-REDEN (Paroladoj)

de doktoro Zamenhof, tradukita en la germanan de d-ro E. Pfeffer.

Por la unua fojo aperas en nacilingva vesto la kongresaj oratoradoj de la Majstro. La progresemaj germanoj per sia idiomio jam konigas al la ne-Esperantleganta publiko la esencon k celadon de la grade mondonvekanta invento de Zamenhof. Imitinda ekzemplo al tradukantoj en aliajn lingvojn. Do signifoplena verko estas ĉi tiu de d-ro Pfeffer, konata laboranto en la kampo de nia serioza literaturo. Tre eble estas ke la teksto nacilingvavintento al germanaj varbotoj k varbigantoj lasi la belrican originalon nelegita. Tamen oni ne povas dubi pri la altiro de multaj homoj al la sincera idealeco k nepre aminda personeco kiuj certe brilas ankaŭ en la tradukaĵoj. Ĝojige estos vidi nacilingvajn verkojn en plena detalo pri la vivo de Zamenhof, ankoraŭ preskaŭ nekonsolata de la publiko.

Ke Esp-o superas nacilingvojn laŭ kompakteco k frazneteco facile vidigas per komparo de kiuj ajn paĝoj de la originalo k traduko. Kvankam pli diklitere presita la Esp-aĵo devas enlasi al si blankajn spacojn por ke ĝi ĝuste sampaĝu kun la germana. La plena Esp-a originalo sidas flanke de la tradukaĵoj, tial al negermanlingvanoj ni ankaŭ konsilas aĉeton de ĉi tiu legenda libro, plena de kuraĝa espero k inspiro, el kies fonto ni ĉiuj, eĉ la plej fortikakoraj, sentas iam k iam soifon trinki.

La fama Letero al Borovko pri la origino de Esp-o estas inkluziva, k enkadriginda fotografaĵo de la amata doktoro ridetas bonvenige al legontoj. 170 pĝ. Prezo 1.20rm. Libreja Fako de "Heroldo de Esp-o," aŭ per AEA.

ROBO.

**AL NIAJ SUBTENANTOJ.**

Danke ni kvitancas ricevon de abonoj jene:— S-ino Sainsbury 4/6, aŭg., '30; f-ino G. Marshall 4/6, junio, '30; J. Widdowson 4/6, aŭg., '30; A. Kelley 10/-, okt., '30; C. Clarke 4/-, majo, '30; Box no. Swan Hill 2/6, feb., '30; D. Munro 4/6, sep., '30; Melb. Esp. Soc. 5/6, anonco, aŭg., '30; E. Hart 4/6, aŭg., '30; f-ino P. Hart 4/6, junio, '30.

**KURSO PER TRADUKADO.**

(kondukata de s-ro G. Gordon,  
F.B.E.A.)

Sek-iino; Miss B. Blyth, 10 Victoria-  
av., Surrey Hills, Melbourne, E.10.

**TRADUKO 2****GIPPSLANDA MISTERO.**

(daŭrigata)

Estis (1) sciate (2), ke la nigruloj havas emon diri al demandanto (3) tion, kion ili supozas, ke tiu deziras aŭdi, tial pli maltrankviliga ol nigrulaj rakontoj estis tio, kion eltrovis aro de pioniroj en la jaro mil-okcent-kvardek-unua. Tiuj trafis (4) iujn bivakantajn (9) nigrulojn, kiuj pro timo tuj rapide forkuris, lasante (5) kvin arboŝelajn kanotojn. Inter la materialo uzita (6) por ŝtopi la ekstremaĵojn de la kanotoj por bari eniron de akvo estis korpviŝilo kaj objekto el virina vestaĵo. Kompreneble estis, ke tiuj fabrikaĵoj povis veni en la posedon de la nigruloj el rompita ŝipo aŭ estis ŝtelitaj el domo de kolonietano (7); tamen tiu eltrovo kune kun tiuj de kurioza desegnaĵo ĉe la loko de la forlasita bivakejo kaj de sago montranta (6) al la sovaĝejo forte subtenis tiujn, kiuj petis pri serĉa ekspedicio. Tuj oni sin turnis al la registaro en Sydney, kaj ĝi organizis kaj sendis du serĉantarojn (8). Unu serĉantaro, konsistanta (6) el kvin blankuloj kaj naŭ nigruloj ĉefata (6) de sinjoro de Villiers ekveturis de Melbourne la dudekan de Oktobro mil-okcent-kvardek ses sur la vaporŝipo Shamrock (elp. ŝamrok). La intenco estis surbordiĝi apud aŭ Port Albert aŭ Ram Head (elp. hed) aŭ insulo

Rabbit, kiel ajn permesos veteraj kondiĉoj, kaj poste disigi en du balenajn boatojn. Ĉiu serĉantaro estis bone armita kaj portis provianton (10) por kvar monatoj kaj provizon de fiŝkajoj kaj -ŝnuroj, lankovriloj kaj aliaj objektoj ŝatataj (6) de la nigruloj. Aparte (11) interesa estis granda nombro da poŝtukoj, sur unu flanko de kiuj estis presitaj Angle kaj Gael la jenaj vortoj:

"Blankula virino.—Dek kvar armilhavaj viroj, iuj blankuloj iuj nigruloj, serĉas vin. Estu ruza kaj kuregu al ili, kiam vi vidos ilin en via proksimeco. Precipe vigligu en mateniĝo ĉiutage, ĉar estas tiam, ke la serĉantoj (3) esperas vin savi. La blankula kolonieto (7) estas en la direkto al la sunsubiro." La serĉantoj alfiksis la poŝtukojn sur la trunkojn de arboj, por ke ili altiru atenton de indiĝenoj kaj donu al la virino informon pri la serĉantaro (8). Sur la alia flanko de la tukoj estis presitaj bildoj por mirege interesi la indiĝenojn. Oni en la presaĵo uzis la Gaelan lingvon pro tio, ke antaŭ kelka tempo barko rompiĝis sur Ninety Mile Beach (elp. najnti majl biĉ. t.e. Naŭdekmejla marsablaĵo), kaj inter la netrovitaj pasaĝeroj estis virino el la montara regiono de Skotlando kaj ŝia edzo. La serĉantoj ankaŭ sur la arbojn alfiksis spegulojn, kies dorso surhavis tiel saman komunikon. (daŭrigata)

**NOTARO 2**

1. Senpersona uzo de "estis" sekвата de adverba participo. Cox 164.
2. "estis sciate" aŭ "oni sciis."—3. Substantiva participo. Notaro 1/9.—
4. "upon disturbing" en la originalo estas Angla gramatika formo ne permesbla en Esperanto. Cox 211b.—
5. Adverba participo. Cox 211c.—
6. Adjektiva participo. Notaro 1/6.—
7. Bone estas distingi inter "colony" (kolonio) kaj "settlement" (kolonieto)—
8. "partio" ne havas la ĉi tiean sencon. "Aro" estas la ĝusta vorto. Vidu Mill.—
9. Indiĝenoj ne posedas tendojn.—
10. "provianto" Vorto uzata

**DO YOU ENJOY GOOD HEALTH?****SANA—SANA—SANIGA.**

Thanks to Esperanto, Australia is now able to benefit from Switzerland's foremost medical discovery, NOVOCHIMOSIN (Novo-Kim) which is a remedy for every type of gastro-intestinal disorder and its sequels. "Incurable" cases yield to this remedy, which contains no drugs or chemicals, being a biological product.

All chemists CAN supply "Novo-Kim" or it will be forwarded upon receipt of a P.N. for 5/- by the agents: The Saniga Company of Australia, P.O. Box 1106, Melbourne.

de Zam. kun la signifo de "provisions for maintenance."—11. "aparte," ne "speciale," kiu enhavas la ideon de "purpose," kiel en Ekz. 19/7. (N.B. En tiuj ĉi notaroj "Ekz" signifas "Ekzercaro de d-ro Zamenhof," "Mill." signifas "The Esperanto-English Dictionary de Millidge.")

Rondaneco de tiu supra tradukantaro kostus al vi nur kvar pencetojn monate! Turnu vin al la sek-iino!

### ESPERANTO AND THE POST OFFICE.

Esperanto is more and more finding support from the official authorities of posts, telegraphs and telephones. The General Directorate of the Bulgarian Posts, Telegraphs and Telephones recommend the study of Esperanto to postal servants. The General Directorates of the Posts, Telegraphs and Telephones of Rumania, authorised the organisation of a course in Esperanto by the P.T.T. School in Bucharest and the use of the language in accordance with the requirements of the Postal Service.

### International Conferences.

The International Touring and Advertising Conference held at Frankfurt during Easter of the present year, used Esperanto with great success as the sole language for translation.

The Congress of the World Federation of Educational Associations in Geneva, 25th July-4th August, used Esperanto as a language for translation and discussion in certain sections.

An Esperanto Discussion Group will be formed during the International Pedagogic Congress at Helsingor, Denmark, from 8-12 August.

### Official Subsidies for Esperanto.

On the occasion of the 21st Universal Esperanto Congress in Budapest, the Normal School of the Hungarian Capital organised a special Esperanto Course for teachers in co-operation with the J.J. Rousseau Institute of Geneva. The Town of Budapest granted a subsidy to provide gratuitous board and lodging for 30 foreign participants. The Swedish Parliament voted a subsidy of 3,000 crowns (£168/15/-) for the organisation of similar courses. The Minister of Public Instruction of Estonia also granted financial assistance to the Esperanto organisation of that country.

### Exhibitions.

The International Colonial, Maritime and Flemish Art Exhibition to be held in Antwerp in 1930, is carrying out publicity work by means of Esperanto. It has distributed a considerable number of prospectuses and advertising stamps in that language. The directorate of the Horticultural Exhibition at Courtrai has also issued an advertising stamp in Esperanto.

### Science.

The Observatory of Taten (near Tokyo), has now for the third year published its lengthy aerological report in Esperanto.

### KRONIKO.

MELBOURNE.—Okazos en Novembro la ekzamenoj por la Unua Provo kaj la Diplomo.

Je la 12a de Septembro okazis la tria dancado en la "Rivoli." La afero tre sukcesis pro la senĉesa laborado de la komitato. Krom la kutima "Monte Carlo," le dancantoj portis ĉapojn el papero. En ĉiu ĉapo troviĝis numero, kaj oni donis premion al tiu kiu havis la bonŝancan numeron. Duonon de la profito de la dancado oni donacos al U.E.A. S-ro Skurrie faris kelkvortan propagandan paroladon.

La Societanoj aranĝas por pikniko, kiu okazos je la 10a de Novembro. F-ino V. Cox afable metos je dispono de ekskursanoj sian dometon ĉe Belgrave, kaj ĉiuj Esperantistoj estos bonvenaj. La renkontoj estos: "Philomena" Station Strato, Belgrave, kaj de la domo flirtos la Esperanto flago.

CHRISTCHURCH, N.Z.—Jam la soc. atingis ĝis 34 membroj, k ties ĉeestoj ĉe kunvenoj sufiĉe kontentigas. En soci-vespero f-ino Saunders, la gastiganto, donis al ĉiu ekzempleron de poemo "La Sago kaj la Kanto," anoncanta ke tiu, kiu povos post monato plej bone deklami ĝin premion ricevos. Vigla vendado de lernolibroj daŭras. Ŝajne, malgraŭ ke la aĉetoj de tiaj libroj sidas ĉe Wellington, la tuta provizo estas ĉe ni! Je la 16a de sep. s-ro N. Bell, M.A., nia prez-o, parolis de radiejo 3YA pri Esp-a gramatiko. La sek-io, s-ro A. More, 48 Hackthorne-rd, Cashmere Hills, la 17an de sep. instruis klason de 32 geknaboj, starigitan responde al deziro de tiuj esprimita al La Onklino, kiu gvidas la porinfanan rondon en tagjurnalo Star. La infanoj avidas lerni k facile kapablas akiri la elparolon k komencan vortprovizon. Kiam ili jam povos bele paroli E-te, la gepatroj nepre sentos emon lerni!

**AUCKLAND.** Nov-zelando. — Lernantoj aliĝas ĉiusemajne la societan klason, kiu kreskas koraltige. Kelkaj progresintoj jam celas B.E.A. diplomon. Aprobite de la soc. tre povos disflugi ĉien varbil-folio presita en nombro 4000. Per radiejo 1YA p-tro Wolloxall parolis ĉiuvendrede je 7.40a v. dum tri semajnoj, lastfoje je la 9a de sep., k s-ro G. Wheeler lekciis la 13an. Ĉi tiu nun aranĝas kun la "Star" aperigon de lecionoj, kiujn li klarigos radie. La 2an de sep. s-ro Andrews rakontis spertojn ĉe la Edinburgh Esp. Kongreso. La soc. aranĝis je la 9a plaĉan programon.

**MASTERTON.** N.Z. — La grupo jam rekomencis funkcii la 9an de sep. k preparas anojn por ekzameno.

**WELLINGTON.** N.Z. — La dua ĉiujara kunveno de la klubo okazis la 27an de aŭgusto, kiam s-ro E. Jack prezidis multajn membrojn. S-ro B. Potts prezentis jarraporton, kiu montris detale sur veran frukton el 12-monata laboro. Havante 34 plenkotizulojn je komenco de jaro, la klubo posedis jarfine 46. S-ro L. Dust respondis pri la bilanco, kies ciferoj parolis pri forta financa pozicio de la klubo. Ambaŭ dokumentoj ĉiesvoĉe akceptiĝis. Rilate elekton de nova oficistaro la ĉeestantaro entuziasme reendevigis entute la malnovan, jene: Prez., s-ro E. Jack; vic-prez., f-ino C. Smythson; sek-io, s-ro B. Potts; kasis-to, s-ro L. Dust; oni delegis s-ron Leck traktantoli librotendadon.

S-ro W. King polemikas ĵurnale. Defendante Esp-on ofte aperantaj leteroj vaste konigas la avantaĝojn de nia kara. La UEA jaribro (1929) jam alvenis. La eldonintoj de tiu bonega ja meritas plejeban subtenon.

**BRISBANO** (Kvinslando). — Aperas jam kvara numero de la societa manuskripta gazeto "La Brisbana Bleko," kun diversa enhavo, originala kaj ŝtelita: artikoloj gravaj, anekdotoj, versoj, respondoj al korespondantoj, anoncoj k. t. p. Oni legis ĝin ĉe la societo, kaj poste dispruntis al anoj.

Kampa festo okazis unu dimanĉon apud bela rivereto en Ashgrove. Kel-

kaj noblanimaj samideanoj per siaj aŭto-j portis la anojn de la tramvojoj ĝis la kunvenejo, kie oni manĝis kaj babilis.

La malgranda kurso finiĝis, kaj al la plej bonaj lernantoj oni donacis premiojn: f-inoj N. Littleton kaj D. Graham.

**SIDNEJO.** — Jen ĉefa afero! La ĉiujara internacia balo, organizita de la Sidneja filio de la Unio de la Ligo de Nacioj. Ĉeestate de la alilandaj konsuloj, tiu gaja kunveno ŝajnas semotaŭga kampo por propagando. Tial, la S.E.S. ĝojis akcepti inviton de la komitato sendi reprezentecan grupon. Kontrastate kun la pli grandaj naci-grupoj, kiel ekz. la ĉina, kiu gajnis la ĉef-premion, la E. grupo, cetere bela k atentiga, eble aspektis malgranda. F-ino Bridge k aliaj f-inoj societanaj en la lasta jaro faris kostumojn el verda k blanka teksaĵoj. La afero sendube tiris atenton al la problemo de internacia komunikado.

S-ro I. Serišev alparolis pri "La naturaj riĉaĵoj de rusujo" ĉe la klubo. S-ro Davies legis el "Aŭstralio, lando k Popolo," k s-ro Rutland, la bonekonata, klarigis pri tio, kiel le "Monatoj de la Jaro" nomiĝis.

## REFORMAJ KLOPODOJ EN ESPERANTO.

(Julio Baghy.)

Kiam oni parolas pri reformoj en la lingvo, preskaŭ ĉiam mi konvinkiga, ke la reformemulo tute ne vivas en la spirito de la lingvo kaj li estas gvidata per personaj gustoj, ofte per ekesteraj proponoj. Certe la sama persono ne kuraĝus riski similajn reformojn en sia nacia lingvo, kies spiriton li alproprigis dum la lernejaj jaroj. Respekti la parolatan lingvon ne signifas esti "konservatulo," sed esti aktiva batalanto de la lingva unueco.

Oni ne bezonas longe serĉi la kaŭzojn de kelkaj neĝustaj esprimoj enŝovigintaj en la lingvon, ĉar ĉiu literaturamanta aŭ kelkajn gravajn verkojn leginta Esperantisto tuj povas konstati, ke tiujn malkorektaĵojn nas-

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata, al poŝt-mendoj.

Notu adreson:—

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

## HAROLD PUDNEY

## Specialisto pri Fontanplumoj

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcianta fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiginto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

kis la nesufiĉa lingvoscio aŭ la facilanima ambicio egoista, kiu soifas eĉ je bagatelaj gloroj.

Cetere la periodo de reformoj jam pasis antaŭ 30 jaroj, kaj dank'al la tiamaj pioniroj ĝi ne difektis la sanan evoluon de la lingvo. Hodiaŭ E-to jam ne estas projekto, sed vivanta realaĵo, kies valoro estas taksebla ne sole per ĝia estanteco, sed precipe per tiu vasta perspektivo, kiun ĝi havas por sia estonteco. Kiel elokventa averto staru antaŭ la reformemuloj la historio de Ido, kiu dum sia ekzisto estis nur eksperimenta substanco de personaj gustoj, reformaj tendencoj kaj en la momento, kiam ĝi celis al stabiliĝo, tiam mortis pro du ĉefaj kaŭzoj: la reformemuloj forlasis ĝin kaj la sindonaj adeptoj perdis la fidon al ĝi post la foriro de la aŭtoritatoj.

Ni estu konvinkitaj, ke la kvardek-jara prospero de E-to jam plene pruvis la relativan perfektecon pri la gramatika strukturo. Ĝi ne bezonas do komplikajn aldonojn. Pri absoluta perfekteco oni ne povas paroli en la homa vivo. Estas necese scii, ke ne la gramatiko vivigas la lingvojn kaj ne ĝi donas ilian ĉarmon, sed la sento, kiu spiras vivon en la rigidajn vortojn kaj per la diversaj esprimoj donas koloron al ĉiu frazo. La gramatiko de ĉiu lingvo estas rigida meĥanismo, muelanta la vorttrezoron de ĉiu epoko. Ĝi estas la gardanto de la struktura unueco, sed, neniel ĝi malhelpas la evoluon, riĉigon de la lingvo mem, kies vivo dependas de ĝiaj literaturistoj kaj parolantoj. Precipe tio ĉi koncernas E-ton, kies literatura lingvo edukas la amason, la parolanton tute klare: la popolon de nova vivo kaj nova kulturo. En tiu ĉi lingvo estus do duoble danĝero reformadi eĉ laŭ la gusto de plej kompetentaj lingvistoj. La reformoj de la naciaj lingvoj ne entenis tiom da danĝeroj, ĉar tie el la parolata popola lingvo evoluis la literatura.

Severe ni gardu la lingvan unuecon kaj ne akceptu facilanime iun novaĵon, kiu eble trafas nian guston; en la parolado kaj verkado ni klopodu al la plej granda klareco, sed ne al precizeco superflua, ĉar ĝi estas kontraŭnatura en ĉiu lingvo. Ni rekonu la elastecon de la vortoj kaj fidu al la natura intuicia povo de la aŭskultanto. Sekvante tiujn ĉi principojn nia parolo havos vivan karakteron kaj nia stilo

ne estos rigida fandaĵo de vortoj, de difinaĵoj.

## EL "ANTAŬEN."

**Westralian Esperanto Society**, Niagara Cigno Grupo, kunvenas ĉiun vendredon de 7.30—10 p.t. ĉe 197 Murray-st., Perth, kontraŭ Boan's Ltd. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretario, s-ino E. Sainsbury, "Noeline," Carrington-st., Maylands, W.A.

**Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo**. Prezidanto, S-ro A. Dewar; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu lundo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝejo Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

**Melburna Esperanto-Societo**, Prezidanto, s-ro J. Skurrie; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo.

**Sydney Esperanto Society**. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro A. E. Pryke; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road, Burwood.

**Brisbana Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str., proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Klement Kidd. Viceprezidantoj: Fraŭlino Rose Macpherson; M. Hyde. Sekretario: Fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane, Kvinslando (Queensland).

**Wellington Esperanto Club**.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President. Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralic Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34. Argentine Avenue, Miramar; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.